

Raymond Schwartz,
Pli bone (Naiva kanzoneto)

Raymond Schwartz,
Viel besser ist's (Ein naives Liedchen)

tradukita de Manfred Retzlaff

Pli bone estas teni
Birdeton en la man'
Ol dudek birdojn ... vidi
Sur supro de platan'!

Viel besser ist's zu halten
Ein Vöglein in der Hand
Als zwanzig Stück ... zu sehen
Von fern am Waldesrand!

Pli bone estas pagi
Kotizon al la grup'
Ol frankojn mil malŝpari
Kun diboĉema pup'!

Viel besser ist's zu zahlen
Den Beitrag an den Verein
Als viel Geld zu verschwenden
Mit 'nem leichten Mägdelein!

Pli bone estas stari
En plena veturil'
Ol sidi en malplena
Stomak' de krokodil'!

Viel besser ist's zu stehen
Im Bus mit Leuten viel
Als liegen in dem Magen
Von einem Krokodil!

Pli bone estas sidi
Sur pajlo de karcer'
Ol kuŝi en la ĉerko
Du metrojn sub la ter'!

Viel besser ist's zu sitzen
Im Knast für ein'ge Zeit
Als in 'nem Sarg zu liegen
In alle Ewigkeit!

Pli bone estas kanti
Eĉ laŭ malĝusta ton'
Ol senrespekto ... tusi
En mezo de salon'!

Viel besser ist's zu singen
Wenn auch mit falschem Ton
Als rücksichtslos zu husten
In einem feinen Salon!

Pli bone estas pinĉi
Knabinon en la krur'
Ol tikli episkopon
Ĉirkaŭe de tonsur'!

Viel besser ist's zu kneifen
Ein Mädchen in den Po
Als nachts gebissen werden
Im Bett von einem Floh!²

Pli bone estas senti
Kiseton sur vizaĝ'
Ol senti aŭ ricevi
Piedon sur postaj'!

Viel besser ist's zu fühlen
Ein Küsschen auf dem Mund
Als eine Tritt zu spüren,
Das ist nicht so gesund!

...

...

²oder dem Urtext entsprechender:
Als einen Mönch zu kitzeln
An der Tonsur, nur so!

Pli bone estas skribi
 Insultojn per kraĵon'
 Ol sendi komplementojn
 Per kuglo de kanon'!

Viel besser ist Beschimpfung
 Mit Bleistift auf Papier
 Als freundliche Begrüßung
 durch einen Kanonier!

Pli bone estas manĝi
 Bifstekon kun buter'
 Ol nutri sin per amo,
 Promesoj kaj esper'!

Viel besser ist's zu essen
 Ein großes Bratenstück
 Als leben von der Liebe
 Und hoffen auf das Glück!

Pli bone estas plugi
 La kampojn en oaz'
 Ol sarki tro obstine
 En truoj de la naz'!

Viel besser ist's zu pflügen
 Den Acker voller Müh'
 Als in der Nase bohren
 Mit aller Energie!

Pli bone estas kapti
 Dek muŝojn de l' plafon'
 Ol kapti nazkataron
 Dumnokte sur balkon'!

Viel besser ist's zu fangen
 Zehn Fliegen im Salon
 Als sich 'nen Schnupfen holen
 Des Nachts auf dem Balkon!

Pli bone estas diri
 Stultaĵojn, kiel mi,
 Ol ronki sur fotelo
 De la akademi'!

Viel besser ist's zu reden
 So dummes Zeug wie ich
 Als bei 'nem Vortrag schnarchen;
 Denn so was tut man nich!

Pli bone estas fini
 Ĉi kanton antaŭ fin'
 Ol aŭdi la publikon
 Kriegi: „Fermu ĝin!“

Viel besser ist beenden
 Dies Lied gleich und jetzt,
 Als wenn die Leute schreien:
 “Du hast genug geschwätzt!“

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas
 RAYMOND SCHWARTZ (*1894-04-08 –
 †1973-05-13).

*Traduko de la Esperanta poemo “Pli bone (Naiva kanzoneto)” de RAYMOND SCHWARTZ (*1894-04-08 – †1973-05-13) en la Germanan de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2005-12.*

Arg-802-1608 (2013-01-31 16:08:12)

MR-446-RS-2 / Arg-802-1609 (2013-01-31 16:09:32)

Pri la aŭtoro vidu ankaŭ <http://kabareto.esperanto.cc/> kaj http://eo.wikipedia.org/wiki/Raymond_Schwartz..

Siehe auch: http://de.wikipedia.org/wiki/Raymond_Schwartz. Tiu ĉi poemo estas prenita el la libro „La ĝoja podio“, eldonejo „Dansk Esperanto-Forlag“, represo 1975.